

Kiel organizi Esperanto-kurson

Antaŭparolo

Tiu ĉi dokumento ankoraŭ ne estas finredaktita. Viaj komentoj, korektoj kaj aldonoj bonvenas. Por povi redakti tiun ĉi dokumenton, sendu mallongan retmesaĝon al [felix \[\] tejo.org](mailto:felix@tejo.org)

Tiu ĉi ĉ. 18paĝa dokumento celas homojn, kiuj volas organizi Esperantokurson. La organizado povas, sed ne devas inkluzivan meman instruadon, kiun ankaŭ ekstera instruisto povas transpreni. La varbmaterioj celas ĉefe la kondiĉojn kaj eblecojn en industriiĝintaj landoj. Kelkaj konsiloj estis verkitaj je la organiza fono de la Germana Esperanto-junularo, kaj eble funkcias ĉe vi alimaniere aŭ tute ne. Estu kreema tiukaze.

Tiu ĉi dokumento estas publikigota je libera permesilo CC-BY-SA (detalojn je <http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.eo>)

La menciendaj aŭtoroj estas (enskribu vian nomon ĉi tie):

Enkonduko

La celo de la Esperantokurso

Ni instruas Esperanton ne por instrui Esperanton. La celo de nia Esperantoinstruado estas pligrandigi la aron de aktivaj Esperantoparolantoj. Kiel ĝenerale en lernejo, ne sufiĉas por lerni lingvon ĉeesti ĉiujn lecionojn kaj fari ĉiujn taskojn, kiujn donas la instruisto. Vera ekrego de la lingvo nur okazas, kiam la lernanto veturas en la landon, en kiu parolatas la lingvo. Tiu lando en nia kazo estas Esperantujo.

Antaŭ, dum kaj post la kurso ni devas komuniki pri tiu ĉi bezono por ekregi la lingvon. Ni devas interesigi la homojn pri la renkontiĝoj kaj vekoj en ili la volon elprovi la lernitaĵojn en Esperanta medio. Por komuniki pri tio ekzistas pluraj eblecoj, kiujn ni ankaŭ traktas en tiu ĉi dokumento.

La organizado de Esperantokurso ĝenerale estas pli da laboro ol la efektiva instruado kaj tre tre grava por la sukceso de la kurso, ĉar nur tiel vi povas altiri sufiĉe da kursanoj. Tial tiu ĉi dokumento grandan parton dediĉas al organizado kaj varbado.

Tipa semajnfina kurso

Semajnfina kurso donas la eblecon koncentrite kaj en difinita tempo, kiun eblas liberigi de aliaj devoj, lerni Esperanton. Por eksterurbanoj ekzistas almenaŭ teorie la ebleco veni al ĝi.

En regula kurso povas partopreni nur por proksime vivantaj homoj kaj oftas, ke iu ne povas veni unu aŭ du fojojn kaj tiel maltrafas esencajn lecionojn. Pli facilas ankaŭ dum pluraj semajnoj perdi la emon lerni Esperanton ol dum unu semajnfino.

Kvankam ankaŭ regulaj kursoj povas esti sukcesaj, ni rekomendas semajnfina kurson. La plimulto de la konsiloj en tiu ĉi dokumento estas tamen ankaŭ aplikebla al regulaj kursoj.

Tempo

Bona skemo por semajnfina kurso estas jena:

Vendredo: 20.30 - 22:30

Interkona vespero: Ĉiu prezentas sin
Informfilmo "Esperanto estas" aŭ alia informmetodo
Demandoj kaj respondoj pri la filmo kaj pri Esperanto kaj la kurso

Sabato: 10.00 - 18.00

Unua tago de la kurso
Pensu pri taŭgaj paŭzoj, manĝado ktp.
Vespere eblas organizi ian distran programon, se la lernantoj ne tro lacas

Dimanĉo: 11.00 - 17.00

Dua tago de la kurso
Pensu pri taŭgaj paŭzoj, manĝado ktp.
Vespere eksterurbanoj eble devas jam pli frue forveturi.

Pri regulaj kursoj

La ofte realiĝinta danĝero de regula kurso estas la iom-post-ioma malapero de kursanoj, kiuj perdas emon aŭ ne plu havas tempon. Dum unu semajnfino apenaŭ eblas perdi la emon lerni Esperanton, se ĝi komence de la kurso ekzistis. Dum pluraj semajnoj tio jam pli facilas. Do organizu regulan kurson nur, se vi certas, ke tio en via kazo estas multe pli bone ol semajnfina kurso.

Antaŭ la kurso

Organizado

Kiam komenci la organizadon?

Plej eble frue. Fiksu daton du aŭ tri monatojn antaŭ la okazo por havi sufiĉe da tempo por varbado.

Kiel komenci la organizadon?

Alskribu vian landan sekcion kaj lokan klubon por informi ilin pri via deziro organizi Esperantokurson. Diru, ke vi legis tiun ĉi dokumenton, leginte tiun ĉi dokumenton, kaj demandu, ĉu ili povas helpi pri kreado de la retpaĝo aŭ varbado. Eble eĉ estas taŭga instruisto, kiu pretus veni al via kurso, por ŝpari al vi iom da laboro? Se en via lando ne ekzistas landa sekcio, vi povas peti helpon je la estraro de TEJO aŭ ĉe iu najbara landa sekcio.

Prezo de la kurso

Ĝenerala rekomendo estas, ke la kurso estu pagenda. Tio havas du funkciojn:

Kovri la kostojn

Kursoj ĝenerale kaŭzas kostojn. Eblaj kostoj (sed certe ne ĉiuj eblaj) estas

- lupago por seminariejo
- hejtingokostoj por la seminariejo
- biletoj por la kursestro kaj helpantoj
- manĝaĵoj
- keksoj
- trinkaĵoj
- kopioj
- varbiloj
- ...

Tiujn kostojn eble ne pagas vi, sed iu pagas ilin. Kaj la kursanoj ĝenerale pretas pagi ion por lerni, kaj ne atendas, ke la kurso estu tute senkosta. Por financi la lokan grupon tial bonas difini iun prezon por la kurso, kiu kovras certe la kostojn. Alia vidpunkto estas tamen, ke homoj mirus, se la kurso farus iun grandegan profiton. Do la prezo devas esti modera.

Doni la imagon de kvalito

En la hodiaŭa mondo homoj bedaŭrinde ofte pensas, ke io, kio ne estas pagenda, estas de malpli alta kvalito ol io, kio estas pagenda. Estas multaj ekzemploj por tio, ni nun ne volas diskuti, ĉu tio bonas aŭ ne, sed ĉe la plimulto de la homoj tio laŭ nia sperto veras.

Alteco kaj rabato

Laŭ spertoj bona prezo en Germanio estas

30 € por homoj aĝantaj malpli ol 26 jaroj: Tio certe kovras la kostojn kaj estas pagebla
50 € por homoj aĝantaj pli ol 26 jaroj: Tio donas iom da profito al la kursokaso kaj loka grupo.

Tamen povas esti, ke kelkaj pro certaj kialoj ne volas aŭ povas tiom pagi, kvankam ili tre ŝatus lerni Esperanton. Por tiuj homoj indas meti etan rimarkon en la aliĝilon kaj en la varbadon "Rabatoj laŭ interkonsento eblas. Demandu nin." Pri la alteco ĉiu kursestro mem decidu laŭ la loka situacio. Malfacilas doni ĝeneralaj rekomendojn por pluraj landoj.

Historia komento de Lu:

Mi en la jaroj ĉirkaŭ 1990 kutime prenis prezojn de 50 DEM por studentoj kaj 100 DEM por aliaj – bone funkciis. Ili ne protestis, ĉar tio estis sub la nivelo de popolaltlernejoj. Antaŭ eble unu jaro mi mem enketis pri la prezo de lingvolernejoj: Ĝenerale ili volas havi de la tuta grupo 40 ĝis 60 EUR por unu horo. Se estas dek homoj, la instruhoru kostas do ekde 4 EUR. Ĉ. 16 instruhoroj dum semajnfino do kostas ekde ĉ. 64 EUR. Same kiel mi tiam, hodiaŭ oni povas laŭ mi preni 50 EUR kaj 100 EUR (aŭ eble 40/80, mi ne insistas). Mi preferas prezon de ĉ. du trionoj ĝis samo de la malaltaj ĝeneralaj ofertoj.
(Aldoni eble foton de Lu)

La "gajnon" oni povas ŝpari por havi la monon por varbaj anoncoj en studentaj gazetoj, por povi permesi al si varbagentejon, kiu afishas en ĉiuj universitatoj k.s. Necesas iom ŝpari, ĉar preferinde oni faru kampanjon, kie estas ŝanco, ke la saman homon trafas multaj informoj en mallonga tempo. Aŭ por iam permesi al si iomete pagi la instruanton. Estas pli facile trovi instruanton, se tiu ricevas iom da rekompenco.

Trovi helpantojn

Ne provu ĉion mem fari. Tio frustras iam vin kaj ankaŭ la kvalito de la laboro estas ĝenerale malpli alta ol kiam pluraj faras ĝin. Helpantojn vi povas trovi inter aliaj - prefere junaj - anoj de la loka klubo aŭ en aliaj urboj. Por la preparado ne necesas nepre ĉiam esti en la sama urbo. Pri interreta varbado oni povas tre bone taskigi iun el alia urbo. Bonas havi unu aŭ du helpantojn en la preparado. Konsciu tamen, ke vi estru ilin, taskigu ilin kaj kontroletu ilin. Vi organizas la kurson, do estas via respondeco atenti, ke ekz. varbado funkciis. Tio ankaŭ ŝparas al vi mem poste tristecon kiam ekz. maltro da homoj aliĝas.

Adreslisto de aliĝintoj

Ekde la komenco havi adresliston de la aliĝintoj. Uzeblas por tio ankaŭ google-documents, aŭ evernote, por havi ĝin alirebla de ĉie. Ĝi povas enhavi la sekvontajn kolumnojn:

Nomo Antaŭnomo Retadreso Telefono Strato Urbo Poŝtkodo Naskiĝtago
Antaŭscio Jam pagis (kiom)

Organizi tranokteblecojn por eksterurbanoj

Homoj el alia urbo verŝajne ankaŭ volonte venos al via kurso. Ĉar ili venas el alia urbo, ili kutime ne havas senkostan tranokteblecon en via urbo. Proponu en la informmaterialo organizi por ili tranokteblecojn laŭ interkonsento. Se iu aliĝas kun tiu ĉi peto, skribu al via loka dissendolisto, aŭ mem gastigu la personon. Kutime ne necesas havi iun luksan tranoktejon, sincera gastigemo pli gravas. En kelkaj landoj, ekz. Germanio, oni povas proponi al la aliĝinto dormi sur matraco en dormosako.

Loko

La ejo dependas tre de lokaj kondiĉoj, kaj malfacilas doni ĝeneralajn rekomendojn. En multaj urboj la loka Esperantogrupo havas iun ejon, kiun eblas senkoste aŭ kontraŭ favora prezo uzi. Aliaj eblecoj estas privataj loĝejoj kun sufiĉe grandaj ĉambroj, lernejoj, kafejoj. Atentu, ke eblas senstreĉe paroli kaj kompreni dum la kurso, do ke ne estu muziko enla malantaŭo.

Kiu celgrupo?

Estas pli facile por la instruisto instrui grupon, kiu konsistas el certmaniere similaj homoj. Tio ankaŭ estas kutime pli amuze por la partoprenantoj.

La simileco povas konsisti je aĝo, okupo, fono, antaŭscio ktp. Tio ne estas alvoko diskriminacii homojn pro aĝo ktp. Simple, kiam vi havas elekton kiun partoprenigi en kurso, pripensu, ke plej harmonie estos grupo el similspecaj homoj.

Instruisto kaj instruilaro

Necesegas por Esperantokurso iu, kiu ŝatas instrui Esperanton. Kiu povas fari tion? En Esperantujo nur malmultaj instruistoj estas profesiaj, plimultas amatoroj. Tio ankaŭ estas ĉarma pri la komunumo.

La lingvonivelo de la instruisto estu almenaŭ B1 laŭ la eŭropa referenckadro pri lingvoj. Bonaj indikiloj je tio estas:

- Partopreno en du Esperantorenkontiĝoj kun la sento kompreni preskaŭ ĉion.
- Solida baza kono de gramatiko

- klara prononcado
- Almenaŭ unu jaro da Esperantisteco
- La kapablo kompreni tiun ĉi dokumenton :)

Tiuj kondiĉoj certigas kvaliton de la kurso.

Aldonaj indaj, sed ne nepre necesaj ecoj estas

- simpatia apero
- sperto pri instruado
- juna aĝo

Ĉiu instruisto iam instruis la unuan fojon. Ankaŭ vi povas tion fari, se vi plenumas la bazajn kondiĉojn. Provu! Estos ankaŭ por vi interesa sperto, kaj vi ne riskas grandan damaĝon - fakte, kion vi riskus?

Tesi la testudo

Tesi la testudo estas lernolibro por germanoj.

(Tial nun sekvas germana teksto (tradukinda tamen ankoraŭ al Esperanto).)

Das Esperanto-Lehrbuch "Tesi la testudo" ist in den achtziger Jahren entstanden und vor ein paar Jahren völlig überarbeitet worden. Es eignet sich für Sprachkurse, aber auch zum Selbstlernen. Zu den Übungen sind am Ende des Buches Lösungen angegeben. Das Buch enthält auch ein Wörterbuch in beiden Richtungen (Deutsch-Esperanto und umgekehrt, etwa 2000/2500 Wörter jeweils) sowie einen Index für Grammatik und Themen.

Das Buch hat eine durchgängige Geschichte, die einzelnen Lektionen erzählen von einer Insel, auf der Schildkröten leben, die später eine Reise zu einem Esperanto-Kongress machen. Weiterhin enthalten die Lektionen Erläuterungen zu der jeweils eingeführten Grammatik und Wortfelder, z. B. Essen, Uhrzeit, Gegenstände eines Zimmers, Körperteile usw. Die Übungen sind sehr vielfältig und enthalten auch Sprachspiele für Gruppen. Die Seiten sind reichlich mit Zeichnungen illustriert. Die Umschlagseiten sind aufklappbar, so dass man beim Lesen im Buch vorne die Aussprache, die Endsilben für die Wortarten, die Zeitformen des Verbs und eine Reihe wichtiger Adverbien sehen kann. Hinten sind die Wortbildungssilben ausklappbar.

Die Geschichte ist recht nett geschrieben ist - kein typischer Lehrbuchtext. Es gibt immer mal wieder einen Grund zum Lachen, dazu regen auch die Übungen an. Das ist natürlich förderlich für die Entstehung einer angenehmen Gruppen- und Lernatmosphäre. So habe ich das Buch gerne in unserem Verlag herausgegeben.

(Fonto: Recenso de Lu von Wunsch-Rolshofen ĉe amazon.de)

Materialo

Tesi, la testudo
Bick, Eckhard / Formaggio, Eva u.a./k.a.
EsperantoLand (2006)
232 Seiten, 3. Ausgabe, 23x18 cm
ISBN-10: 3922570801

Erarkorektoj haveblas germanlingve je <http://www.tesitestudo.de/>

(Enmeti grafikon de <http://www.esperantoland.org/de/libroj/bildoj/tesitestudo2.jpg>)

Esperanto en dialogo

Esperanto en dialogo estas lernolibro por germanlingvanoj kreita far Rudolf Fischer. La suba priskribo venas el lia kursmaterialo.

Das Ziel ist, Esperanto auf natürliche Weise, nämlich in der sofortigen Verwendung im Gespräch zu erlernen. Das Lehrwerk ist so aufgebaut, dass man als erstes die häufigsten 500-1000 Wortwurzeln laut einer Frequenzliste der esperantosprachigen Jugendzeitschrift *kontakto* lernt. Hinzu kommen viele, für Deutschsprachige unmittelbar verständliche (seltener) Wörter wie *studento*, *sistemo*, usw. Die Übungsstücke und Textthemen sind auf die Situationen ausgerichtet, die man in Esperantujo ("Esperantoland") am ehesten braucht; man lernt sozusagen gleichzeitig die "Landeskunde". Dazu gehören auch die Geschichte, die Idee und die Einrichtungen der Esperanto-Bewegung, eine Art Einführung in die Esperantokultur.

Auch Esperanto will gelernt sein, das wird man schon bei der ersten Lektion feststellen. Alle Lernenden sollten ihr Tempo selbst festlegen, aber auch die Fremdsprachenerfahrenen sollten sich davor hüten, zu schnell zu einem nächsten Abschnitt überzugehen, wenn sie die neuen Wörter und Satzmuster der vorigen noch nicht mühelos beherrschen. Zum Auswendiglernen wird durchaus geraten, zum Hin- und Herübersetzen nicht. Beim Wiederholen sollte man in jedem Fall laut lesen bzw. sprechen. Schreiben Sie auch immer alles auf, was Sie schon auswendig können; dadurch üben Sie die Rechtschreibung.

Grammatische Regeln werden unmittelbar durch den Text eingeführt. Obwohl die Kenntnis von Regeln beim spontanen Sprechen wenig nützt, sind diese aber wichtig, um zu verstehen, warum manche Wort- oder Ausdrucksform richtig ist, eine andere aber nicht. Unter den Sprachen tut sich Esperanto durch einen ungewöhnlich hohen Grad von Regelmäßigkeit hervor, was die Kreativität beim Sprechen fördert: Ausgehend von dem, was man auswendig gelernt hat, kann man leicht "erraten", wie ähnliche Sätze und Ausdrucksweisen wohl lauten werden (Analogieschlussweise). Im Gegensatz zu anderen Sprachen hat man dabei auch als Anfänger eine sehr hohe Trefferrate.

In den 5 teilweise sehr umfangreichen Lektionen lernt man die häufigsten 350 Wortstämme und viele weitere nützliche Wörter und Ableitungen, insgesamt über 500 Begriffe. Nebenbei wird man praktisch mit der gesamten Grammatik vertraut gemacht; auch in fremden Texten dürfte man mit den Kenntnissen aus den 5 Lektionen auf keine unbekanntenen Elemente der Sprachstruktur mehr stoßen, nur noch auf unbekannte Wörter natürlich

Materialo

La materialo estas senkoste disponebla en la interreto je <http://www.esperanto.de/lehrbuch/>

Cseh-metodo

[Pronconcu Ĉe-metodo]. Ĝi dankas sian ekziston al la fakto, ke [Andreo Cseh](#) estis devigata gvidi Esperanto-kurson antaŭ diversnacia publiko, konsistanta plejgrandparte el laboristoj. Estis en 1920 en la transilvania urbo [Sibiu](#) ([Hermannstadt](#), [Nagyszeben](#)). [Lernolibroj](#) ne estis haveblaj; mendi el eksterlando neeble, ĉar la limoj ankoraŭ fermitaj. [Pastro](#) Cseh defendis tiam ne doni kurson en la ordinara senco de la vorto, sed simplan konversacion. Nigra tabulo kaj kreto helpis la instruiston, papero kaj [krajono](#) la [lernantojn](#). Kun granda entuziasmo okazis la provo. Komence li parolis pri aferoj plej proksimaj kaj uzante nur la plej simplajn gramatikajn elementojn. Poste li transiris iom post iom al temoj pli malproksimaj kaj al gramatikaĵoj pli malfacilaj. Post 20 lecionoj de 2 horoj oni jam povis interparoli en Esperanto. Tiel la Cseh-metodo naskiĝis. La bona rezulto instigis al organizo de similaj kursoj en tuta Rumanujo, kaj poste sekvis invitoj el pluraj landoj.

La metodo komencis sian triumfan vojon tra Eŭropo.

Pro kio la granda sukceso?

Ĉar la metodo estas adaptita al la psiĥo de la moderna homo. La principoj de la metodo estas la jenaj:

- a) neuzado de lernolibroj
- b) neuzado de [nacia lingvo](#), sed klarigo de la novaj vortoj per la jam instruitaj
- c) komuna ĥora respondado de la kursanoj
- d) aplikado de konversacio pri aktualaĵoj anstataŭ uzado de lernejecaj ekzemploj.
- e) riĉa aplikado de [humuro](#) kaj ŝerco
- f) instigo al tio, ke la lernantoj mem eltrovu la [regulojn](#) de la lingvo kaj ke ili mem konstruu la gramatikan sistemon.

Prefere la kurso estas donata de fremdlanda instruisto, por efike plenumi punkton b. Komence oni timis, ke la sukceso dependas nur de la personeco de Cseh, sed baldaŭ evidentiĝis, ke liaj disĉiploj de diversaj nacioj akiris similajn sukcesojn. Andreo Cseh ne deziras doni la tutan [gramatikon](#) en la komenca kurso, sed li volas formi grandan aron da entuziasmaj adeptoj, kiuj fervore daŭrigas la studadon kaj la propagandon. Estas interesa fakto, ke bonaj Cseh-kursoj finiĝas ĉie kun pli multe da lernantoj, ol kun kiom ili komenciĝis. La "Konversacioj" de Cseh estas amuzaj vesperoj kaj oni ne rimarkas, ke samtempe oni akiras la plej potencon rimedon malfermi novan mondon. (fonto: vikipedio)

Materialo

Marček, Stano. *Esperanto per rekta metodo*: Internacia ilustrita lernolibro

Zagreba metodo

Zlatko Tišljari faris [esploron](#) pri ofteco de uzataj morfemoj en parolata Esperanto (en [UK Lucerno 1979](#) li surbendigis parolatan materialon de esperantistoj en ĉiutagaj konversacioj - 60.000 vortojn - kiun li komputile prilaboris) kaj ricevis la liston kun entute 1500 morfemoj el kiuj laŭ ofteco unuaj 467 kovris 95% de la tuta korpuso. En IKS oni elektis teamon (Zlatko Tišljari, [Spomenka Štimec](#), [Roger Imbert](#) kaj [Ivica Špoljarec](#)) kiuj kune disdividis la taskon fari lernolibron atentante ke ĝi ne estu granda (maksimume 12 leciona) kaj ke en ĝi enestu nur la 500 morfemoj de la menciita esploro.

La unua lernolibro aperis eksperimente en 1980 kaj estis dissendita al 350 instruistoj en la mondo kun peto pri iliaj rimarkoj. La kroata versio de la lernolibro estis ŝanĝata baze de la rimarkoj en siaj unuaj 4 eldonoj ĝis la jaro 1985. Stile la lecionojn plibonigis en la 4a eldono Tibor Sekelj. La postaj eldonoj ne plu estis ŝanĝitaj.

Aperis ankaŭ B-lernolibro kaj instrukciaro por instruistoj, aldona bildstrio de C. Piron (kiu verkis ankaŭ 3 apartajn kantojn por ĝi) kaj legromaneto de G.F. Cooper "La sentimulo" bazita je la 500 morfemoj. La kroata versio aperis ĝis 2006 en 9 eldonoj je 42.000 ekzempleroj kaj ĉiuj estis venditaj.

Instruistoj en [Kroatio](#) okazigis amason da kursoj uzante ĝin kun tre bonaj rezultoj. Okazis aro da eksperimentaj kursoj (en 1983 300 zagrebanoj partoprenis en eksperimento lerni laŭ ĝi dum 3 tagoj de unu semajnfino - 12 horojn), poste okazis eksperimentoj por instruistoj de [Aŭstrio](#) kaj Kroatio dum 2 semajnfinoj (24 horoj), kelkaj eksperimentoj pri feriaj kursoj por pliaĝuloj, infanaj kursoj en lernejoj de Aŭstrio, [Slovenio](#) kaj Kroatio) ktp. La IKS-teamo sekvis kaj observis la rezultojn.

Intertempe la baza lernolibro aperis en 30 adaptaj al diversaj - ĉefe eŭropaj lingvoj, sed ankaŭ kelkaj aziaj kaj afrikaj. Nun oni povas lerni per ĝi ankaŭ en elektronika formo ĉe <http://www.lernu.net/> en 26 lingvoj.

Instrukciaro por instruistoj instruantaj laŭ la zagreba metodo helpas la instruistojn enhavante klarigojn pri la metodo, uzeblecon, havante la skemon por 24-hora kurso, enhavante aldonajn ekzercojn, demandarojn, kantojn, ekzamenmaterialojn. Helpe de tiu libreto kaj la lernolibro eblas kvalite instrui en komencaj kursoj ĉiuspecaj (kun unulingva

kursanaro aŭ plurlingva, kun infanoj ekde proksimume 11-a jaraĝo ĝis maljunaj personoj) sen specialaj sinpreparoj. La Zagreba metodo ebligas al lernantoj lerni komence sen balastaj vortoj kaj gramatikeroj nur tion kio estas nepre necesa kaj tuj praktikebla kaj tial la gelernantoj pli rapide progresas ol uzante aliajn metodojn. Tio altigas la lernmotivojn. Kutime jam post la lerno de la unua duono de la lernolibro la gelernantoj povas elturniĝi lingve en ĉiuj ĉiutagaj situacioj. La baza Esperanto-scio akirata per tiu ĉi metodo estas tre konvena kiel instruaĵo minimuma, sed sufiĉa kiel antaŭscio necesa por posta lernado de alia fremdlingvo – do kiel lernendaĵo necesa kiam Esperanto servas kiel propedeŭtika rimedo. (fonto: vikipedio)

Materialo

Esperanto laŭ Zagreba metodo (Deutsch/Germana)
R. Imbert k. a.
(1995)
65 Seiten, 2. Ausgabe, A5
Deutsche Ausgabe (Lernolibro por germanlingvanoj)

Aliaj metodoj

Plian abundan instrumaterialon pri multaj aspektoj de Esperanto vi povas trovi ĉe www.edukado.net
Se vi opinias plian metodon menciindan, enmetu ĝin ĉi tie

Kopiado

Laŭ la de vi elektita instrumaniero, vi devas certigi, ke la lernantoj havu je la dato de la kurso materialon por lerni. Aŭ zorgu, ke ĝustatempe vi ricevas la lernolibron, aŭ simple inkluzivu ĝin en la prezon de la kurso, por ke ĉiu lernanto ĝin havu. Por la lernolibro laŭ la zagreba metodo, tio estas facile farebla. Por "Tesi, la testudo" malpli. Tiam vi devas kopii. Pripensu antaŭe, kiam kaj kiel vi volas fari tion. Ĉar lernantoj pagas kotizon kaj vi ne agas profitcele, vi povas ŝpari al vi streĉon, sendante kopiendan materialon al kopiejo, kiu kopias ĝin por vi. Tiam vi nur devas iri tien kaj preni ĝin.

Varbado

Krei retpaĝon por informo kaj aliĝo

Antaŭ komenci varbadon, devas ekzisti la ebleco informiĝi kaj aliĝi pri la kurso en la interreto. Konstruu do unue taŭgan, eĉ se malgrandegan unupaĝan retpaĝon, al kiu povas turniĝi la interesato. La kreado de informoj en la interreto estas la nepra unua paŝo. Sen ĝi la sukceso de la sekvontaj estos multe pli malgranda. Se vi mem ne kapablas krei retpaĝon, petu vian landan sekcion aŭ iun konatulon helpi vin pri la teĥniko, dum vi verkas la tekstoj. La retpaĝo estas esenca ero de via varbado.

Ebla strukturo de retpaĝo

Jen priskribo de taŭgaj elementoj de retpaĝo.

La nepraj estas:

- Titolo: Esperantokurs en via urbo
- Dato, tempoj, loko, prezo de la kurso
- Adreso je kiu eblas aliĝi aŭ formularo

- Kontaktdatumoj por pliaj demandoj
- Nivelo de la kurso (ekz. por komencantoj sen antaŭscio)

Aldonindaj estas:

- Ligiloj al informoj pri Esperanto ĝenerale, ekz. en la paĝaro de via landa sekcio.
- informoj pri la antaŭ la kurso traleginda materialo
- aliĝformularo por montri profesiecon kiu enhavu
 - Nomon
 - Aĝon
 - Retpoŝtadreso
 - Telefonnumero
 - Poŝtkodo (por scii kie proksimume loĝas)
 - Bezonas tranokteblecon (se vi ofertas tion)
 - Kiel eksciis pri la kurso
 - Denaska(j) lingvo(j)
 - Kiujn lingvojn parolas
 - Kiom longe jam lernis Esperanton
 - Kiun lernstilon preferas inter la du ekstremoj
 - gramatike kaj teorie
 - lude kaj praktike
- raporto pri pasintaj kursoj kun artikoletoj kaj fotoj de partoprenintoj
- indikoj pri kiel estos organizita manĝado
 - eblas formulare demandi pri dietoj aŭ limigoj en manĝado kiel ekz. alergioj aŭ vegetaraneco
- Bezono de tranoktebleco

Eble via landa sekcio havas jam ian pretan retpaĝon por tiu kazo, kiun nur necesas adapti. Kontaktu ilin, kreonte la retpaĝon, por ŝpari al vi mem laboron.

Certiĝi, ke la paĝo troveblas bone

Kelkajn tagojn post la kreado de la retpaĝo, provu, ĉu ĝi facile troveblas per la serĉilo Google, ekzemple per la serĉvortoj '*Esperanto kurso Viaurbo*'. Certigu, ke la paĝo afiŝiĝas en alta loko. Tion vi povas atingi per aldono de taŭgaj frapvortoj en la dokumento mem kaj en la meta-dokumento. Se vi mem ne scias, kiel fari tion, demandu la retejestron de via landa asocio aŭ konatulon pri tio.

Kiel varbi?

Ekzistas tri ĉefaj varbmetodoj: interreta, afiŝa kaj persona. Ili sube estas klarigitaj.

Virtuala

La plej grava varbmetodo estas interreta varbado. Se via kurso ne estas trovebla en la interreto, ĝi ne okazos. Do zorgu pri tio, ke vi havu laŭeble altan videblecon kaj belan bildon en la interreto.

Afiŝoj

Tre bona varbmaniero estas ankaŭ la varbado per afiŝoj. Zorgu, ke facilas preni kontaktinformojn, ekz. pere de fortireblaj slipetoj. Ekzemplo por afiŝo estas en la kursmaterialo

Persone

Ankaŭ viaj amikoj kaj kolegoj volas scii ion pri la kurso. Dece kaj informcele - ne varbcele - rakontu, ke vi organizas semajnfinan kurson kaj eble kiujn problemojn aŭ ideojn ili havas. Vi povas ankaŭ testi vian varbmaterialon ĉe ili. Se ili interesiĝas, ili mem anonciĝas, ke ili volas partopreni.

Kie varbi virtuale?

Varbado virtuala eblas per multaj rimedoj. Jen ni prezentas kelkajn. Por ĉiuj validas, ke vi nepre enmetu ligilon al la retpaĝo pri la kurso en vian tekston.

Retaj komunumoj

Hodiaŭ retaj sociaj komunumoj estas tre popularaj inter multaj internaciemaj junuloj, kiuj estas grava parto de nia celgrupo. En diversaj landoj ekzistas diversaj tiaj komunumoj.

facebook

Paĝo: www.facebook.com Se ekzistas grupo pri via lando kaj Esperanto, enskribu tie informon pri la kurso kaj ligilon. Vi povas ankaŭ krei eventon pri la Esperantokurso aŭ skribi noton je via muro. Tial almenaŭ viaj amikoj ekscias pri ĝi.

kaioo

Paĝo: www.kaioo.com Se ekzistas grupo pri via lando kaj Esperanto, enskribu tie informon pri la kurso kaj ligilon. Vi povas ankaŭ krei eventon pri la Esperantokurso aŭ skribi noton je via muro. Tial almenaŭ viaj amikoj ekscias pri ĝi.

Ekzistas ankoraŭ multe pli da sociaj retoj, vi verŝajne konas la koncernajn en via lando. Ĉi tie ni montras la ekzemplon de Germanio:

studivz

Paĝo: www.studivz.de . Ĉi tie ekzistas grupo "Esperanto", en kiun indas enmeti la ligilon al la kursa retpaĝo kun eta priskribo

Inter jamaj partoprenantoj de distanckursoj

En la datumbazoj de distancaj kursoj troviĝas amaso da homoj, kiuj iam volis eklerni Esperanton aŭ jam eklernis. Ili tre atingeblas per varbado, ĉar ili jam interesiĝis pri lernado de Esperanto. Oni devas do nur proponi sufiĉe interesajn opciojn por ili, por reveki tiun ĉi intereson.

Ĝenerala sperto estas, ke homoj je la unua alskribo ne reagas. Tial indas skribi post semajno duan fojon referencante la unuan retpoŝton, al kiu vi ne ricevis respondon (se tiel estis!) kaj ŝatus havi konfirmon pri jes aŭ ne. Multaj homoj tiam skribos al vi, ke ili dankos pro la informo, sed ĝuste tiun semajnfinojn ili ne havas tempon kaj tamen partoprenus volonte alian kurson je alia semajnfino. Notu iliajn adresojn por povi varbi por la sekvonta fojo, aŭ se vi neatendita devas ŝanĝi la daton de la kurso.

lernu!

www.lernu.net estas reta lernkomunumo de la asocio e@i. En Germanio laŭ nia sperto tiuj homoj ne malofte ankaŭ pretus vojaĝi al via kurso. Verku taŭgan invitilon (temlinio, teksto, ligilo, kontaktadreso) kaj sendu ĝin al sonja@ikso.net kun indiko al kiu lando kaj kiu nivelo la komuniko estu sendita. Ŝi prizorgos la reston.

Partoprenantoj de la brazila kurso

La brazila kurso baziĝas je elŝutebla programo por lerni komputile elŝutebla je <http://www.kurso.com.br>. Ĝenerale, la landaj sekcioj transprenas la mentoradon de la lernantoj. Skribu al via landa sekcio por eltrovi, kiu nun okupiĝas pri la administrado. Tiu ĉi persono devus helpi vin pri la dissendado. Ĉar la homoj estas mentorataj far via landa sekcio, ne devus ekzisti datumrajtaj problemoj, se via asocio organizas kurson, ĉar la datumoj restas ene de la landa sekcio.

Partoprenantoj de la retroŝta aŭ papera kurso

La samo kiel por la brazila kurso validas ankaŭ por retroŝtaj kursoj: Alskribu vian landan sektion kaj dissendigu ilin vian materialon.

Nuntempe en papera koresponda kurso partoprenas ĉefe maljunuloj, kiuj ne havas interretaliron. Por la Esperanto-junularo tio ne estas la plej grava celgrupo. Principe ankaŭ eblas tie varbi, sed unue elĉerpu la aliajn eblecojn zorge.

Kursa datumbazo je esperantoland.org

Je www.esperantoland.org troviĝas kursa datumbazo, en kiu estu enskribita ĉiu kurso ie ajn en la mondo. La datumbazo estas ankaŭ alirata kaj uzata far aliaj paĝaroj, do necesas enskribi tie ankaŭ vian kurson, se vi volas, ke multaj homoj ĝin trovu.

Kursa datumbazo je edukado.net

Ankaŭ ĉe <http://www.edukado.net/pagina/Kursoj/153//> ekzistas kursa datumbazo, en kiu vi povas enskribi vian kurson, se vi estas registriĝinto ĉe edukado.net

www.viaurbo.kijiji.epo

La paĝaro www.kijiji.com estas paĝaro pri ĉio ajn. Ĝi estas dividita laŭ urboj kaj por ĉiuj grandaj urboj ekzistas apartaj paĝoj. En la paĝoj por grandaj urboj ekzistas ankaŭ subpaĝoj por malgrandaj urboj. Se via urbo ne enestas, enskribiĝu en la paĝaro de la plej proksima urbo. Ĉe [kijiji.com](http://www.kijiji.com) eblas ankaŭ enmeti anoncon pri lingvokurso. Verku taŭgan anoncon kaj enmetu ĝin tie.

Enirpaĝo de la landa sekcio

Landaj sekcioj havu interretpaĝon. Kutime tie ne troabundas novaĵoj. Verku teksteton pri via kurso kun ligilo al la retpaĝo de via kurso kaj lasu ĝin enmeti en la ĉefpaĝon kiel novaĵon.

Lokaj gazetoj

Tre indas verki gazetaran komunikon, kiun vi sendu al loka gazeto du aŭ tri semajnojn antaŭ la kurso, por ke ili havu sufiĉe da tempo enmeti ĝin. La gazetara komuniko enhavu

- Etan priskribon de Esperanto
- Priskribon de Esperantovivo en via urbo, se ekzistas :)
- Daton, tempon kaj lokon de la kurso
- Nomon de la asocio, kiu organizas la kurson, ekzemple via landa sekcio
- Kontaktdatumojn (kun retpaĝo kaj telefonnumero)

Por pliaj detaloj, kiel skribi gazetaran komunikon rigardu la sekcion "post la kurso"

Aliaj organizoj

Ofte ekzistas simpatiaj organizoj al la Esperanto-junularo. Ekzemple la Germana Esperanto-junularo havas pro historiaj kialoj amikecajn rilatojn kun la asocio pri samseksemulo.

- Aliaj eble simpatiantaj organizoj estas:
- Bahai
- Verduloj
- Komunistoj
- Vegetaraj grupoj (ekz. en Germanio la Deutsche Reformjugend)

Dissendolisto kaj papera informilo de la loka klubo

Ofte lokaj kluboj havas paperan aŭ retan informilon, kiun ili regula dissendas. Zorgu, ke eta anonco pri via kurso estu en ĝi. Por tio necesas sufiĉe frue prepari la tekston, por ke ĝi aperu ĝustatempe. Ĉar kutime pli aĝaj homoj legas tiujn paperajn informilojn, zorgu, ke en la teksto estas menciita, ke la kurso ĉefe celas junulojn (se estas tiel). Ofte pliaĝuloj havas infanojn, do ĉiukaze indas alparoli ilin. Ju pli da homoj scias pri la kurso, des pli bone. Tial ankaŭ zorgu, ke via anonco trairu la liston.

Amikaro

Certe ankaŭ en via amikaro ekzistas homoj, kiuj interesiĝetas pri Esperanto. Se vi ne volas perdi viajn amikojn, tamen ne troigu la varbadon. Simpla informo, ke vi organizas Esperantokurson kutime sufiĉas. Se ili interesiĝas, rakontu pli. Bonas ankaŭ simple paroli pri la problemoj, kiujn vi havas pri la organizado. Tio estas bona kaŝa varbado kaj la alparolato ne sentas sin tro altrudata.

Kie varbi afiŝe

Afiŝo povas esti tre bona varbilo. Se ĝi pendas ie, estas bona ideo havi je ĝi fortireblajn adreslipetojn. Ili enhavu

- la temon, ekz. "Esperanto-kurso Berlin 24./25.01.09"
- ligilon al la retpaĝo kaj
- telefonnumeron, por alparoli ankaŭ homojn sen retaliro.

Por ĉiuj ĉi-sube menciitaj ejoj validas, ke ne nepre vi mem devas tien iri. Sufiĉas koni iun, kiu povas unu fojon tien iri. Aŭ koni iun, kiu iun konas...

Studentaj domoj

Studentaj domoj estas inter la plej eble bonaj varbejoj, ĉar tie estas kleriĝantaj junuloj, kiuj ofte estas internaciemaj. Krome tie estas multaj eksterlandanoj, kiuj ankaŭ povus interesiĝi pri la kurso. Ja al via kurso ne nepre devas veni nur samnacionoj.

Universitato

Pro la sama kialo indas varbi en universitato. Kutime tie estas sufiĉe da eblecoj por pendigi afiŝeton. Povas esti, ke en via urbo aŭ proksime al via urbo ankoraŭ estas pliaj universitatoj, en kiuj eblas varbi. Provu ankaŭ varbi tie. En universitato ekzistas pluraj lokoj por pendigi afiŝon. La plej sukcesaj estas

- enirhalo
- antaŭ la manĝejo
- lingvolernocentro

Ĉar tie studentoj de ĉiuj fakultatoj estas. Sed certe ankoraŭ indas pendigi afiŝojn en la unuopaj fakultatoj, eĉ kun amuzaj frapfrazoj kiel

"Inĝenieroj konstruas bonajn maŝinojn, kio pri konstruitaj lingvoj?"

"Ekonomikistoj volas efike uzi resursojn - ĉu ankaŭ en lingvolernado?"

"Biologistoj miras pri la vivo - ĉu ankaŭ pri la vivo de artefarita lingvo?"

Tiaj frapfrazoj povas plialtigi la nombron de legantoj de via afiŝo, se ili estas deforvideble printitaj sur la afiŝo.

Lernejoj

En lernejoj estas (aŭ iam estis) idealismaj junuloj - kiel eble ankaŭ vi estis. Verku taŭgan afiŝon kaj lasu ĝin pendigi en plej eble multaj lernejoj de via urbo. Vi povas printi ĝin al PDF-dosiero kaj sendi al lernejoj retpoŝte. Zorgu, ke vi alskribas ĉiun lernejon unuope kun nomo. Tio plialtigas la eblecojn, ke iu instruisto pendigas la afiŝon.

Kiel varbi persone

Persona varbado estas pli laboriga ol virtuala aŭ afiŝa. Sed la vido de vivanta ekzemplero de Esperantoparolanto jam konvinkis multajn provi lerni la lingvon, principe, kiam li aŭ ŝi interesiĝe prezentas la lingvon kaj sin mem.

Partopreno en foiroj

Kun la helpo de via landa sekcio aŭ loka grupo vi povas partopreni en foiroj kaj urbaj festoj kun informbudeto. Faru tion nur, se vi ricevas helpon. Sole estas tro da laboro.

Organizado de aldonaj informvesperoj

Informvesperoj povas esti tre utilaj kaj ne nepre kaŭzas multe da laboro, depende de viaj kontaktoj. Se iel vi havas kontakton al lernejoj, altlernejo, studenta domo aŭ ne E-aj organizaĵo, vi povas proponi fari tie informvesperon (kiun vi ankaŭ povas privarbi laŭ la rekomendoj de tiu ĉi dokumento :)).

Ebla programo povas esti:

1. Sinprezento de vi mem
2. Montrado de la filmo "Esperanto estas..." Mendu DVD-on ĉe via landa sekcio aŭ e@i, se vi ankoraŭ ne havas ĝin. La kostojn (5 €) vi povas kovri per enspezoj el la kurso
3. Demandoj kaj respondoj.

Plejbonkaze vi sukcesas pretigi paperetojn kun informo pri la kurso, kiun vi povas disdoni dum la informvespero.

Ĵus antaŭ la kurso

Kelkaj tagoj antaŭ la kurso kreskas la nervozeco. Ĉu estos sufiĉe da lernantoj? Kiom estas sufiĉe dependas de via instrumaterialo kaj la ejo disponebla por instruo. Povas esti bona ideo ne akcepti pli ol 12 lernantoj en la kurso por konservi bonan grupan etoson. Krome ankaŭ povas esti interesa sperto por lernemuloj, ke ili ne povas partopreni en Esperantokurso, ĉar estas tro da aliĝintoj. Vi povas poste organizi pluan kurson por tiuj, kiuj ne povis partopreni en la unua.

Sendu kelkajn tagojn antaŭ la kurso informan retroŝton kun ĉiuj logistikaj informoj. Ekzemplon vi trovas en la apendico.

Dum la kurso

Interkona kaj informa vespero

En kurso por komencantoj sen antaŭscio gravas ne nur instrui la lingvon, sed ankaŭ peri informojn pri Esperantujo kaj plekti amikecon inter la kursanoj. Je la komenco de la kurso indas do fari informan kaj interkonan vesperon.

Interkonatiĝo

Por la interkonatiĝo plej facilas, ke ĉiu laŭvice respondu al demandoj. Eblaj demandoj estas:

- Kion vi faras en la vivo?
- kiom aĝa vi estas?
- Kiel vi eksciis pri Esperanto?
- Kiom kaj kiel v jam lernis Esperanton?
- Kiun nivelon vi supozas havi post la kurso?
- Kiujn aliajn lingvojn vi konas?

Informado

La plej senstreĉa kaj informriĉa maniero por informi pri Esperanto kaj Esperantujo estas montrado de la filmo "Esperanto estas...", kreita en 2008. Ĝi estas mendebla je DVD ĉe la organizo E@I aŭ eble ankaŭ via landa libroservo.

Lernmetodoj

Eĉ dum kurso por komencantoj vi povas jam paroli Esperanton, ekz. pri iuj organizaj aferoj. Tiel ili al kutimiĝas al la sono de la lingvo. Parolu tiam klare kaj malrapide kaj traduku almenaŭ la esencon al la nacia lingvo.

Esperanto-objektoj

Bonas povi montri tuŝeblajn signojn de Esperantujo kaj Esperantokulturo, kiel libroj, komiksoj, muzikaĵoj, filmoj, ktp. Kelkaj eble eĉ volas aĉeti T-ĉemizon (okazis!). Se ne estas tro fortoraba por vi, certigu, ke estas kelkaj folklorajĵoj disponeblaj.

Helpantoj

Kiel jam klarigite, indas havi helpantojn. Espereble vi trovis kelkajn. Jen kelkaj konsiloj:

Unu ĉefas, aliaj helpas

Se vi organizas la kurson, vi estas la ĉefo. Zorge planu la tutan projekton laŭ tiu ĉi manlibro, viaj spertoj kaj taksoj kaj konsiderante la konsilojn de aliaj. Estru ĝin, disdonante taskojn kaj kontrolante iliajn plenumon. Diru al la aliaj vian opinion pri la estrado, kaj klarigu, ke vi sentas vin kiel ĉefo. Tio evitas miskomprenojn kaj malefikan laboron, ĉar iu faras taskojn, kiujn li ne estu farinta aŭ kiujn jam alia faris. Vi estras kaj kunordigas la laboron de la helpantoj.

Ĝenerale nur unu klarigas.

Multaj kuiristoj malbonigas la kaĉon. Ne bonas, kiam multaj klarigas, eĉ pli se samtempe, ĉar tiam la lernantoj konfuziĝas. Se vi estas plurope, klarigu al ĉiuj antaŭe, ke la instruisto klarigas, kaj ne la helpantoj. Escepto kompreneble estas laboro en malgrandaj grupoj.

Manĝado: ĉu mem kuiri aŭ ien iri?

Kutime dum semajnfina kurso la lernantoj volas ankaŭ manĝi. Tio ankaŭ povas esti bona okazo por la lernantoj konatiĝi inter si kaj preparoli la lernitaĵojn. Ekzistas baze du eblecoj. Kuiri mem aŭ iri ien.

	Mem kuiri	Ien iri
Avantaĝoj	<ul style="list-style-type: none">• pli malmultekoste• bone por la etoso	<ul style="list-style-type: none">• ĉiu povas mem elekti ion laŭ sia gusto• irado el la domo povas boni, ĉar distras
Malavantaĝoj	<ul style="list-style-type: none">• necesas manĝilaro• necesas antaŭa aĉetado• necesas kuiristo• povas malfacili konsenti pri manĝaĵo pro alergioj, dietoj ktp.	<ul style="list-style-type: none">• tempo por irado kaj mendado forprenas aldonan tempon por la kurso• pli multekosta

Ĉiu organizanto mem decida pri la organizado. Se vi povas trovi iun, kiu kuiras kaj lavas la manĝilojn, dum vi instruas kaj se en la kursejo disponeblas manĝiloj, tiam pli bonas mem kuiri. Se ne, prefere iru ien por manĝi.

Kolekti eĥon kaj adapti la kurson

Ne eblas antaŭvidi ĉiujn dezirojn kaj etosojn de la partoprenantoj. Tial gravas, ke vi dum la kurso tre atenta observu kaj sentu, ĉu la lernrapideco enordas por ĉiuj partoprenantoj. Ne hezitu demandi post la unua duono de la unua tago kiel plaĉas al la partoprenantoj, kion ili ŝatus ŝanĝi en la kurskoncepto ktp.

Pliaj konsiloj

Eksterlandanoj

Por eksterlandanoj, kiuj partoprenas en via kurso, povas ofte pli malfacili traduki ion de Esperanto al la nacia lingvo, ol simple paroli Esperanton. Ne pensu do, ke eksterlandano havas pli da problemoj pri Esperantolernado. Povas simple temi pri problemo traduki de unu fremda lingvo al dua fremda lingvo.

Plani plulernadon post la kurso

Je la fino de la kurso demandu, kiel la homoj volas plulerni. Ne provu trovi jam surloke daton por la nova kurso, sed sugestu trovi tiun daton post la kurso retpoŝte. Tiam ĉiuj havas trankvilecon kaj superrigardon por diri kiuj datoj taŭgas. Ja al neniu helpas trovi daton rapide, al kiu poste kelkaj ne povas veni. Certe multaj partoprenantoj pretas lerni iom sole hejme ĝis la sekvonta kurso.

Post la kurso

Kiam dimanĉovespere la kurso finiĝas por la partoprenantoj, ankoraŭ kelkaj taskoj atendas vin. Indas dissendi resuman retpoŝton al la partoprenintoj. Ĝi enhavu:

- Ligilon al enketo pri la kvalito de la kurso
- Ligilon al enketo pri la dato de la sekvonta kurso.
- Informoj kiel lerni plu ĝis la sekvonta kurso
- Informoj pri renkontiĝoj de la lokaj kluboj
- Informoj pri lokaj dissendolistoj
- Informoj pri baldaŭaj renkontiĝoj, al kiuj ili povus veturi

Enketo pri la kvalito de la kurso

Por doni al vi eĥoon pri la kurso kaj scii, kion vi povus fari eĉ pli bone dum la sekvonta kurso. Indas kolekti la opiniojn de la kursanoj. Tiel, vi ankaŭ povas montri al aliaj kaj ankaŭ al sekvontaj kursanoj, kiom bonaj estas viaj kursoj. Krome vi ekscias, pri kiuj gramatikaĵoj vi devas precipe atenti por sekvontaj kursoj, se evidentiĝas, ke ĉiuj unu apartan ne komprenis, ekzemple.

Taŭgaj senkostaj iloj por fari retan enketon ekzistas. Fari bonan enketon estas tre komplika, kaj ni nun ne enprofundiĝos tro en tiun temon. Ekzemplaj enketoj vi trovas je Taŭga senkosta servo estas polladdy.com - tie vi devas fari nenion. Eĉ pli bona programo, kiun vi povas instali je servilo estas limejuice. **TEJO disponigas al interesatoj aliron al tiu ĉi programo** je sia servilo. Kontaktu tiucele vian landan asocion.

La enketo povas demandi pri diversaj aspektoj de la kurso:

- lernprogreso
- instruisto
- etoso
- organizado
- sekvontaj kursoj

Se vi kreas propran enketon, provu montri ĝin unue al iu por testi antaŭ uzi ĝin en la kurso.

Ekzemplo por enketo povas esti jena:

Lernado pri gramatiko

La sekvontajn gramatikaĵojn mi komprenis de 1 (tute ne) al 5 (komplete)

Gramatikaĵo	1	2	3	4	5
Akuzativo por la direkta objekto					
Akuzativo post prepozicioj					
Vortkonstruado per afiksoj kaj sufiksoj					
Refleksiva pronomo si					
Ĝenerala konstruo de frazoj					

Instruisto

Demando 1 2 3 4 5

Mi ĉiam
komprenis la
klarigojn de la
instruisto

La instruisto
ĉiam
respondis al
miaj
demandoj
kontentige

La instruisto
ekkonis mian
lernrapidecon
kaj adaptiĝis
al ĝi

Mi ne enuiĝis
dum la kurso

Estis paŭzoj,
kiam mi
bezonis ilin

Ĝenerala percepto

Bonvolu enskribi kiom vi konsentas kun la eldiro (1 = tute ne, 5 = tute)

Demando	1	2	3	4	5
La etoso en la kursa grupo tre plaĉis al mi					
Devintus partopreni pli da homoj en la kurso					
Mi ricevis la informojn pri la kurso tre frue kaj povis bone plani					
La antaŭinformoj pri la kursoj, kiujn mi ricevis, estis ampleksaj kaj trafaj					
Ĝenerale mi estas tre kontenta pri tiu ĉi kurso					

Estonteco

Demando	Jes	Ne	Mi ne scias
---------	-----	----	-------------

Mi volas partopreni en plia kurso			
Mi volas memstare plulerni ĝis la sekvonta kurso			
Mi volas partopreni en Esperanto-aranĝo en la sekvontaj ses monatoj			
Mi volas denove renkontiĝi kun la homoj el tiu ĉi kurso			
Mi povas rekomendi tiun ĉi kurson al aliaj			

Komentoj en libera formo

Nomo (libervola)

Sekvonta kurso

Kutime unu kurso ne kontentigas la partoprenantojn kaj ili ŝatus havi duan kurson por pliboniĝi en Esperanto. Necesas trovi daton konvenan al plej eble multe da homoj. Taŭga ilo por konsentiĝi pri datoj troviĝas je www.doodle.ch. Kreu tie enketon pri datoj, kiuj konvenus al la instruistoj kaj lasu voĉdoni la partoprenintojn pli la plej taŭga dato.

Sekvontaj renkontiĝoj

Kiel klarigite komence, la celo de la kurso estas pretigi homojn al partopreno en Esperantoaranĝoj. Jen do gravas doni informojn pri taŭgaj renkontiĝoj en la proksima estonteco. Se vi ne certas, kiuj aranĝoj taŭgas, ne hezitu demandi vian landan asocion aŭ aliajn helpantojn.

Gazetara laboro

La pinta profesiaĵo de la kursorganizado estas la posta raporto pri ĝi en gazetoj. Bonegus, se vi verkus gazetaran komunikon kaj dissendus ĝin al lokaj gazetoj.

La gazetara komuniko estu:

aktuala: pretigu la tekston jam antaŭ la kurso kaj por povi fini detalojn pri partoprenantoj ktp ene de dek minutoj post la kurso por tuja dissendado

hierarkia: Certigu, ke ne endas legi tutan komunikon por kompreni pri kio temas. En la komenco jam respondu al la demandoj Kiu? Kio? Kiam? Kie? Kiel? La respondo al la demando Kial? vi povas meti en la ĉefan parton de la komuniko.

komprenebla: uzu klaran kaj kompreneblan lingvon. Faru mallongajn frazojn, kiuj estas rapide kompreneblaj. Ĝenerale frazo ne pli longu ol 15 vortoj.

kontrolebla: Evitu troigojn, memlaŭdon kaj nekontroleblajn konstatojn. Donu fontojn por viaj konstatoj kaj alparolebluloj, kiujn oni povus kontakti por ekscii pli.

alloga: donu klaran strukturon al via gazetara komuniko, kiu estas samtempe okule alloga.

Ĝi kompreneble priskribu iom la kurson, la etoson, la rezulton, la plulernadon - kaj Esperanton!

Sendu la komunikon al gazetoj en via urbo, radio, kaj loka televido kaj pretu respondi por intervjuo.

Utilaj adresoj

Via landa sekcio:

Deutsche Esperanto-Jugend
Einbeckerstr. 36
10317 Berlin
bero esperanto.de
030-42857899
www.esperanto.de/dej

Libroservo:
www.esperanto-buchversand.de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Ret: oficejo tejo.org
Tel: +31 10 436 1044
Faks: +31 10 436 1751

[Diese Seite bearbeiten \(sofern Sie über die erforderlichen Rechte verfügen\) |
Google Text & Tabellen – Textverarbeitung, Präsentationen und Tabellen im Web.](#)